1-a Jaro, N-o 32

APERAS S.A.T. SEMAJNE

7. Majo 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

| Redaktoro: N. BARTHELMESS Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: E. LANTY 24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI. | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz |
|---|---|---|

## Du pereintaj nekonataj soldatoj de la revolucio

(Memore pri k-doj Baginski kaj Wieczorkiewicz)

Ili pereis, ne ekkontaktinte kun tiuj laboristaj masoj, sub kies standardo ili deziris batali. Ili pereis, kaj la laboristaro, al kiu ili sian vivon oferis, ne konis ilin.

Mi ankaŭ neniam vidis ilin, sed mi klare vidas ilian spiritan bildon. Necesas ke la laboristaro ne nur de Polio, sed ankaŭ de la tuta mondo konu ilin.

* * *

Ambaŭ estis unuj el tiuj, kiuj estis ankoraŭ junaj, kiam eksplodis la internacia milito. Ili ĉiuj ne sciis, kio estas socialismo kaj kiel la proletariaro batalu por sia emancipiĝo. Sed ili amis sian popolon kaj ili revis pri libera Polio sen sinjoroj kaj sen subuloj, sen kapitalistoj kaj sen laboristoj. Ili revis pri la popola, demokrata Polio. Ili profunde malamis la rusan carismon, kiu estis sufokanta la polan popolon.



*W. Baginski* *A. Wieczorkiewicz*

Kiam eksplodis la imperialisma milito, ĝi estis por ili duobla tragedio: ne nur la laboristo estis pafanta la laboriston kaj la vilaĝano la vilaĝanon, sed ankaŭ polo el Poznanio kaj Galicio devis pafi polon el la Vistula lando. Do se oni devas perei, ili rezonis, oni pereu por sia afero, por restarigo de la sendependa popola Polio. Kaj ili aliĝis al la rondetoj de Pilsudski, kiu promesis al ili, ke venis horo por restariĝo de la libera Polio pro interpaŝiĝo de la grandaj potencoj; necesas nur ekstari sub standardon de unu el la subpremantoj, necesas servi al ĝi, por ricevi rekompence por la helpo farita Polion.

La afero procedis alivoje, ol ili esperis: Ne el la manoj de la triumfanta aŭstrogermana imperialismo, promesinta liberecon al Polio, sed el malfortiĝo reciproka de ĉiuj turmentintaj Polion imperioj, el forigo revolucia de Romanov-oj, Hohenzollern-oj kaj Habsburg-oj naskiĝis la sendependa Polio.

Ne la popolaj masoj, sed la burĝaro kaj grandaj terposedantoj, kapitalistoj ekprenis la regadon.

Tamen la armeo pola estis ankoraŭ en la manoj de la "liberiginto" Pilsudski. Oni esperis al la "socialisto" Pilsudski. Kaj kiam Pilsudski vokis kontraŭ la bolŝevika Rusio, kontraŭ Rusio, kiu ĉiam estis por la poloj kiel sinonimo de barbara jugo, la masoj ekkredis, ke estas la sama malnova Rusio, etendanta siajn manegojn al la gorĝo de la malfeliĉa Polio, kaj ili iris por defendi ĝin kontraŭ la "malamiko".

El la milito kontraŭ Sovet-Rusio ili elportis la ordenojn "virtuti militari" kaj malplenecon en la koro: ili vidis la Ruĝan armeon, kiu heroe batalis sen ŝuoj kaj sen municio, ili vidis la ruĝajn standardojn, aŭdis de malproksime la sonojn de l' "Internacionalo" kaj en antaŭurbaj regionoj de Varsovio ili vidis iufoje malamekbrilojn en la okuloj de la laboristoj rekrutitaj.

Kio ĉio ĉi estis? Pro kio kaj por kio?

Kaj poste, kiam ili retrovenis al la regimentoj, militlernejoj, ili ekvidis, kiel pli firma kaj pli aroga fariĝas la reakcio, kiel ĝi atakas ĉiujn regionojn de la pola vivo.

Polio!

Ili revis pri ĝi, kiel pri la respubliko de laboro, pri la respubliko de libera penso, pri la respubliko de lumo en kelo ĝis mansardo, kiel pri la lando de frateco kaj egaleco inter ĉiuj popoloj, loĝantaj la spacon inter Dnjpro, Bugo kaj Vistulo.

"Polio — la lando de laboro!" Sed la laboro estas jugita, katenita.

"Polio — la lando de libereco de l' penso!" Sed ne ekzistis epoko en la historio de Polio, en kiu same sovaĝe regis la mezepokeca mallumo kaj same furiozis la klerikalismo, kiel nun en la "sendependa" Polio!

"Polio — en la ligo kun la liberaj popoloj!" Sed neniam vidis Polio similan "pogrom"-agitadon kontraŭ la ukrainoj, belarusoj kaj judoj, kiel nun.

La duboj de la soldatoj-patriotoj kreskis. La atmosfero ĉirkaŭ ili estis plidensiĝanta. Ĉio estis persekutata, kaj triumfis la sama kajzera kaj cara oficiro — nur en la pola uniformo.

La duboj de la junaj oficiroj kreskis.

* * *

Malnovaj gloraj tradicioj de la polaj revolucianoj, de la ribelintoj kontraŭ la cara despotismo en 1863, de la kuraĝaj poloj batalintaj sur la barikadoj de la Pariza Komuno en 1871, de la strikintoj kaj ribelintoj en la ĝenerala Rusa revolucio en 1905, kuna suferado kun la rusaj revolucianoj en la punlaborejoj de malproksima Siberio kaj multaj aliaj faktoj el la historio de la revolucia movado, senpere ligitaj kun partopreno de la poloj, fordonintaj sian sangon por la komuna bono de ĉiuj popoloj, de la tuta homaro — ĉio ĉi daŭras lumi eĉ en la densa malluma haladzo de la blinda furiozanta ŝovinismo de la nuna Polio.

Vespere, en ĥemia laboratorio de la pola generala stabo, leŭtenanto Baginski, studante la gasmiliton, kaŝe estis leganta malpermesitajn eldonaĵojn kaj estis pripensanta ĉion travivitan kaj okazantan. Konscie kaj kore li estis konsentanta la pravecon de la klaso laborista kaj de ĝia batalo kontraŭ la kapitalisma sistemo. Fidelan kamaradon je tiuj ĉi pensoj li trovis en sia amiko subleŭtenanto Wieczorkiewicz (legu: Vieĉorkieviĉ). Sed iliaj simpatioj kaj inklinoj estis rimarkitaj, kaj oni komencis ilin spioni.

La pola "defenzywa", kuniganta en si la sperton de la rusa "oĥranka" kun la sperto de la spionsistemoj de Metternich kaj Bismarck, ĉirkaŭis ilin per spionoj kaj provokistoj, kiuj el la politikaj konvinkoj kaj simpatioj al la komunismo bakis proceson pri spionado kaj pri partopreno en teror-agoj de neekzistanta pola "sovetorganizaĵo". La akuzitoj ne estis komprenantaj, kio okazas. Ili timis, ke konfesonte la komunismon, ili kompromitos la komunistan partion kaj Sovet-Rusion, kaj per sia silentado ili estis sankciantaj la elpensaĵojn de la provokistoj

* * *

Oni devas koni Polion, oni devas koni la tutan turmentan pezecon, kiun devas elporti la pola patrioto, kutiminta opinii Rusion kiel malamikon, por transiri al la komunismo, estanta standardo de la Sovet-Rusio. Nur tiam oni povas plene taksi la tutan heroecon de ilia silento.

Ili trankvile akceptis la mort-verdikton, kondamnitaj kiel agentoj de alia ŝtato. Ili, kiuj estis nur agentoj de la estonta granda ŝtato de la liberigota laborpopolo pola, ili silente suferis du jarojn, ne dezirante eĉ krii al la ekzekutistoj fiere: "Ni, soldatoj de la proletaria revolucio, mem estos viaj juĝistoj".

La Soveta registaro kontraktis kun la pola pri ilia interŝanĝo kontraŭ akuzata en Rusio pro seksa krimo pola pastro kaj nelegala pola konsulsekretario trovita en Sovet-Unio. Sed en la pola gazetaro oni levis furiozan kampanion kontraŭ tiu ĉi interŝanĝo, ĉar Baginski, estinta oficiro de la generala stabo, tro multe sciis, kaj jen la 29. marto, je duonhoro antaŭ la interŝanĝo, jam ĉe la limo inter la Pola Respubliko kaj Sovet-Unio, ambaŭ — Baginski kaj Wieczorkiewicz estis de pola policano mortigitaj — ili, kiuj jam per unu piedo staris ĉe la pordo de la libero.

* * *

Ili ne ekvidis Sovet-Rusion! Korpoj iliaj restos kuŝi en la katenita per ĉenoj de la kapitalo pola tero, kaj frata mano ne ĵetos faskon de ruĝaj rozoj sur ilian tombon. Sed kiam la polaj laboristoj forigos la jugon de la burĝaro kaj bienposedantaro, tiam al la tomboj de Baginski kaj Wieczorkiewicz iros la polaj laboristoj, kun amo rememorante tiujn ĉi du batalintojn, heroe pereintajn por la afero laborista dum florado de siaj fortoj, senhezite fordonintajn siajn junajn vivojn, feran volon kaj sangvinajn korojn.

Laŭ Radek — *Jeniec.*

---

# El Siberio

Por tutmonda proletpubliko povas esti interesa stato de ekonomia restariĝo en plej malproksimaj kaj ekonomie malfortaj regionoj de Sovet-unio. Kiel modelo por ĉi regionoj povas servi gubernio de Irkutsk, lokita en geografia mezo de Azio apud lago Bajkal. La gubernio (sen la post Revolucio formiĝinta Burjatio) okupas ĉ. 800 000 kv. kilometrojn, sed havas nur 700 000 loĝantojn, kiuj plejparte terkulturas. Mi donas kelkajn ciferojn, kiuj povas ilustri ekonomistaton de l' gubernio. En pasinta jaro estis semitaj 272 000 hektaroj, t. e. ĉirkaŭ 90% de l' ĝismilita plugareo. En la sama jaro estis ekspluatitaj 313 000 hektaroj da herbejoj. Tuta kvanto da brutaro (kun ŝafoj) en 1917-a jaro estis ĉirkaŭ 1 000 000, en la jaro 1924 ĝi jam superis 1 500 000 kapojn. Vilaĝanoj nun pli produktas porfabrikajn kreskaĵojn — linon, kanabon kaj similajn. Industrio same kreskas. Mi parolas pri loka industrio, kiu produktas precipe por bezonoj de loka loĝantaro. Mi ne parolas pri tutuniaj entreprenoj (ortrovejoj, fervojoj ktp). Ĉi loka industrio ellaboris en jaro 1923 da ĉiuj varoj por 4 542 600 rubloj, sed en la jaro 1924 ĝiaj produktaĵoj jam valoris 5 190 800 rublojn.

Propra buĝeto de l' gubernio, uzata speciale por lokaj bezonoj (ne por armeo, ne por universitato regna, ne por fervojoj ktp.) povas bone montri ĝian ekonomian staton. Tial mi donas ĉi buĝeton por nuna jaro (inter oktobro 1924 kaj oktobro de 1925). En nuna jaro ĝiaj enspezoj tute senmanke respondas al elspezoj (5 130 183 rubloj). Jen estas la buĝeto:

**La enspezoj:**

1. Lokaj entreprenoj (elektrostacioj, transportiloj, ekspluatado de gubernia havaĵo ktp.) liveras 2 094 183 rublojn.
2. Diversaj lokaj impostoj (uzataj speciale nur por bezonoj de l' gubernio) donas 1 700 000 rublojn.
3. Vilaĝanoj-terkulturistoj per speciala imposto donas nur 682 000 rublojn.
4. Regno helpas lokan buĝeton per 148 000 rubloj (sole por servi al lokaj bezonoj de armeo ktp.)
5. El rezervaj sumoj estas ĉerpataj 182 000 rubloj.
6. La resto el buĝeto de pasinta jaro estas 324 000 rubloj.

Ensume la enspezoj egalas 5 130 183 rublojn.

**La elspezoj:**

1. Por 490 lernejoj kun 37 000 lernantoj, por 17 infandomoj kun 2400 infanoj, por 265 politikklerigejoj (legejoj en vilaĝoj, kursoj, kluboj ktp.) estas bezonaj 1 594 229 rubloj.
2. Por 101 malsanulejoj kun 1000 litoj — 614 000 rubloj.
3. Por bezonoj de urboj — 570 000 rubl.
4. Por gardi publikan ordon — 368 000 r.
5. Por 54 juĝejoj — 112 000 rubloj.
6. Por 32 plenumkomitatoj, 277 vilaĝaj sovetoj kaj kelkaj gubernaj kaj distriktaj institucioj — 664 000 rubloj.
7. Por lokaj bezonoj de Ruĝarmeo (hejtado, lumo k. s.) — 183 000 rubloj.
8. Por ripari vilaĝajn vojojn kaj por intervilaĝa komunikado — 342 000 r.
9. Por 27 bestkuracejoj, 21 agronomoj kaj 5 terofícejoj — 135 000 rubloj.
10. Por socia helpo al invalidoj — 55 000 r.
11. Por likvidi ŝuldojn — 232 954 rubl.
12. Por helpi mankojn de diversaj subbuĝetoj — 196 000 rubloj.
13. Por eksterordinaraj elspezoj — 64 000 r.

Ensume la elspezoj egalas 5 130 183 rubl.

Por ke oni povu fari komparojn kaj konkludojn, mi donas ankoraŭ kelkajn ciferojn. Regna buĝeto de tuta Unio egalas 2279 000 000 rublojn. Ekster tio sumo da ĉiuj lokaj buĝetoj estas 850 000 000 rubloj. 82% da ĉiuj enspezoj estas donataj de impostoj, nur 18% el ili estas puraj profitoj de diversaj regnaj entreprenoj. Produktajoj de ĉiuj regnaj entreprenoj en tuta Sovet-Unio devas valori en nuna jaro ĉirkaŭ 3½ miliardojn da rubloj (krom porarmea produktajo). Tuta sumo da monsignoj cirkulantaj en marto en Sovet-Unio estis ĉirkaŭ 800 000 000 rubl. (el ili ĉirkaŭ 10% arĝenta kaj kupra mono). Unu amerika dolaro egalas al 1,94 rubloj.

---

Oficialaj ciferoj de ĉi artikolo (iniciatita de Krjukov) montras, ke proletaro de irkutska gubernio vivas ne lukse. Sed vi vidas, ke ĝi sukcesas mem aranĝi sian ekonomian bonstaton eĉ en ege malfacilaj cirkonstancoj de Siberio dronanta en senfina maro-oceano de praarbaro kaj pramontaro. Tial ne kredu al viaj burĝanoj, kiuj ĉiel penas estingi vian kredon pri viaj fortoj kaj kapabloj. Kuraĝu, kraĉu estimemon al viaj ventruloj, metu al diablo la viajn dion, naciemon kaj burĝon kaj sekvu nian ekzemplon. Tuta estraro de nia gubernia Financejo estas malnobelaj kaj malburĝaj simpluloj similaj al Krjukov kaj mi. Ĉu vi estas malpli lertaj kaj kapablaj?

Vivu sennacia proletaro de l'mondo!

*Financestro de irkutska gubernio Basoviĉ.*

# La antibolŝevista tendencproceso en Leipzig

Dum daŭro de pli ol 2 monatoj antaŭ la regna tribunalo okazis la famkonata spionproceso, celanta frakasi la kompartion germanan. Tiu proceso ne subite estiĝis, la kapitalista klaso sufiĉe profunde aranĝis ĝin, por plej efike trafi k. p. Kiam 1924 la balotado por la novelekto de la germana parlamento prepariĝis, subite aperis en la gazetaro tendencartikoloj, markitaj per grandliteraj surskriboj: Germanaj "Ĉeka"-agoj, komunista "Ĉeka" senmaskigita, 14 "Ĉeka"-mortigistoj arestitaj ktp. La celo de ĉi tiu antibolŝevista propagando estis, trafi grandan partion dum la balota batalo kaj timigi etburĝaron. Dum la traktado antaŭ la tribunalo montriĝis la fakto, ke la policestraro en Stuttgart mem enŝovis tiujn artikolojn en la gazetojn. El tiu agmaniero, kiun oni neniam uzis, se faŝistoj estis akuzitaj, rezultiĝas, ke la ŝtato mem gvidis tiun antibolŝevistan propagandon, ĉar polico estas brako de la ŝtato kaj nur plenumas, kion ordonas la ŝtato. La pruvon, ke nur estas celata politika tendencproceso, la aranĝintoj mem liveris, traktinte la aferon de la 16 kulpigitoj, kiuj nur parte estis iam anoj de k. p., dum apenaŭ du semajnoj, kaj akuzon kontraŭ k. p. oni pritraktis dum daŭro de 6 semajnoj, klopodante pruvi ke k. p. ne nur estas danĝero por la ŝtato, sed ankaŭ nur aro de fimortigistoj, kiu celas frakasi politikajn kontraŭulojn per veneno, gaso, baciloj kaj bomboj. Same sensenca kiel la akuzoj kontraŭ k. p. estis la tuta traktadmaniero antaŭ la tribunalo. De komenco ĝis fino ĝi konsistis el krimoj kontraŭ la leĝaj paragrafoj. La estro de la juĝistaro, la "formanĝegulo de komunistoj" Niedner, aŭtokrate estris. Ĉiujn dirojn de atestantoj, favoraj al k. k., kaj ĉiujn krimojn kontraŭ la leĝo, kiujn li faris, konstatitajn de la defendistoj, li malpermesis protokoli. La ĉefakuziton li uzis samtempe kiel "kron"atestanton[1]) kontraŭ k. p. malgraŭ ke li estis pagita spiono. Per subtila gvidado li nur provis kolekti materialon kontraŭ k. p. metante en la buŝon de la "kronatestanto" la respondojn. La komunistan defendiston, kiu akre protestis, li lasis forigi per policistoj. Rezulte de tio la defendistoj (ankaŭ la burĝoj) forrestis dum 2 tagoj, alveturinte Berlin'on por persone protesti ĉe la koncerna ministro kontraŭ tiuj novaj rimedoj de Niedner. Nature — senrezulte. Niedner plu traktaĉis laŭ sia plaĉo, furioze alkriegante la diversajn defendistojn, se ili atakis lin. La lastajn tagojn li eĉ rifuzis akcepti atestontojn, motivante tion per preskaŭ ne kredebla eldiro: "Ili estas komunistoj, pro tio ankaŭ ne konfidindaj!?" La tuta tendencproceso estas kronita per la juĝo (kiu verŝajne jam antaŭ la komenco de la proceso estis preta), kiun proponis la ŝtata prokuroro. Li pledis por 5 mortkondamnoj kaj preskaŭ 80 jaroj da karcero. Mirigaj por ni ne estas ĉi tiuj 3 mortkondamnoj verdiktaj ĉar estis antaŭvidebla tiu fino. Ĉefaĵo estas ke oni ne atingis tion, kion oni volis kaj intencis, nome la kompromiton de k. p. Ĉiu infano en Germanio scias ke tiu proceso estis "bato en la akvo". Per la aŭtokrata traktado la aranĝintoj mem forigis la grundon por estontaj atakoj. Eĉ multaj burĝaj gazetoj kondamnis la fian konduton de "komunistfrakasanto" Niedner. Ĉi tiun fojon la burĝoj ankoraŭfoje kondamnis laboristojn. Kiom longe ankoraŭ? Estonte ni estos la juĝistoj... Tiam ve, fikapitalistaro! *Voko.*

[1]) ĉefatestanton.

---

# TRA LA KLASBATALO

Hindenburg estas elektita regna prezidanto de Germanio.

La hispana registaro malpermesis manifestojn kaj laborpaŭzon dum unua de majo.

La sanga teroro en Bulgario kontraŭ laboristoj-kamparanoj daŭras kun nelimigita furiozeco.

Anglaj aviadiloj bombardis Irakajn loĝantojn, kiuj rifuzis partopreni je konferenco kunvokita de la anglaj aŭtoritatoj.

Ni ricevis sekvantan telegramon: Al esperantistoj laboristoj tutmondaj. Salutante en tago de 1 majo ni esperas vidi vin en vicoj de batalantoj por liberigo de laborantoj. — Tveraj esperantistoj.

# Letero el Rumanio

En Rumanio, kiu estas la klasika lando de laboristpersekutoj, nun estas prilaborata de "kompetenta" komisiono interesa por ĉi-landa lab.-istaro leĝoprojekto debatota post kelka tempo en rumana parlamento. Ĝi estas nomata: "Codul Muncii" (La kodo de Laboro"). Ĝiaj ĉefaj trajtoj estas jenaj:

1. Peraŭtoritata labordevigo kaj forigo de strikrajto, t. e. estos malpermesate striki.
2. Leĝigo de l' 8-hora labortago.
3. La t. n. divido de jarfina profito de industriaj akcisocietoj ankaŭ por laboristoj, alivorte ke ankaŭ lab.-istoj de l' koncernataj akcisocietoj ricevu proporcian dividendon.

Kontraŭ ĉi-leĝoprojekto energie bataladas unuflanke la labordonantoj, aliflanke laboristaro. Sufiĉas rigardi la 1 an punkton por pravigi la kontraŭstaron de lab.-istoj kaj se ni legas pri legaligo de 8-hora labortago, ni komprenas la starpunkton de mastroj. —

Analizante la punktojn ni povas konstati, kion celas la registaro per la 1a punkto. Se ĉi-projekto estus leĝigita, la tutlanda lab.-ista movado estus neniigita! Ĉar se al lab.-istaro estas malpermesate striki, ĝi ne povas konkiri pli bonan salajron, pli tolereblajn vivkondiĉojn, la ekspluatado fariĝus pli efika kaj ĉi-landa lab.-istaro fakte fariĝus sklavaro! —

Al la registaro verŝajnis, ke kontraŭ ĉi-leĝprojekto ekbatalegos la lab.-istaro. Kaj por eviti ĉi-tion, por senigi la lab.-istaron je ĝia forto, do ĝuste tiam, kiam oni ekkonis la trajtojn de "Codul Muncii", ekkomencis la registaro la lab.-persekutadon, arestis, en fortikajon karcerigis pli ol 500 kamaradojn, gvidantojn de l' unueca sindikat-movado, por igi la lab.-istaron senpova je ĉia kontraŭstaro. —

La legaligo de l' 8-hora labortago ne gravas por ni. Ni ja konas tre bone la karakteron de rumana registaro, por kiu ne validas leĝoj, eĉ la de ĝi donitaj, kiam temas pri porlab.-ista leĝo. Sufiĉas citi fakton unikan. Ankaŭ la rumana registaro subskribis la internacian konvencion pri l' 8-hora labortago, kaj nun, kiam 5000 segejlab.-istoj estas lokaŭtitaj, ĉar ili ne volis labori 10 horojn potage, nun la registaro nenion faras por devigi la mastrojn ke ili "honoru" la leĝojn — t. e. leĝon pri 8-hora labortago —, tiujn leĝojn, kiujn ankaŭ ĉi-registaro akceptis, sed — ne plenumis. —

Laŭ la labordonantoj; ilia batalo estas direktita ĉefe kontraŭ la 3a punkto, la proporcia dividendo ankaŭ por laboristoj. Kiom ajn ni tamen estu kredemaj al la leĝoj, sed ĉi-supra estas nekredebla. — Ĉar ĉu ĝi estas — la dividendo — laŭleĝa, ĉu ne, ne estas klarigite, kiamaniere estas certigote al la laboristoj interesataj, ke ili ricevos la dividendon? Kiu garantias, se iu laboristo — okaze de ĝia nericevo — postulos la dividendon, ke li ne estos tuj maldungata? Se ni havus uzinajn sovetojn,

se ankaŭ la reprezentantoj de l' interesataj laboristoj sidus en la gvidantaro, rajtus fiksi la dividendojn, tiamaniere jes, estus ebla la proporcia divido, sed nun, kiam ni vivas en tia lando, kie laboristaro estas senrajta maso, tiam estas neebla ĉia ajn "porlaborista" leĝo. — *SAT-ano 1762.*

## Morton al la tiranio!

*Tiu ĉi artikoleto estas verkita* **antaŭ** *la bombeksplodo en Sofio. Ĉar ni post tiu okazo nenion ricevis el Bulgario, ni represas ĝin, kvankam prokraste, por komprenebligi al niaj legantoj, en kiuj teruraj kondiĉoj vivas bulgara popolo, kondiĉoj kiuj donis vere sufiĉan kaŭzon por la okazigo de l' buĉado en la katedralo. Al la turmentantoj la turmentojn, al la suferigantoj la suferojn! Red.*

Sendube la plej faŝisma lando sur la terglobo estas mia patrujo. Nenia proletgazeto aperas. Ĉio estas sufokita, sole la burĝara gazetaro senĉese skribas plej nekredeblajn aferojn pri la nelegalaj proletorganizaĵoj kaj malkovras ĉiutage diversajn revolucikomitatojn, armilojn k. t. p.

Neordinare estas, se vi ne legas iun tagon, ke "hodiaŭ" mortigitoj ne estas. Alivorte, ĉiam vi legas pri mortigitaj aŭ sufokitaj revoluciuloj. Antaŭ kelkaj semajnoj k-do Zdravejkin donis al tutmondaj Satanoj nomaron kun mortigitaj ekskompartianoj.

Nun la nomaro daŭras: k-do *K. Ŝulev*, studento de la ŝtatuniversitato, naskita en Koprivŝtica, arestita kiel "danĝera" en la Sofia "sendanĝerejo", sin ĵetis el la kvara etaĝo de tiu ĉi ejo sur la trotuaron kaj post kelke da horoj mortis.

K-do *Asen Simeonov*, studento el vilaĝo Gigen, eksoficiro, ekskompartiano, estas mortigita en Sofio. —

K-do *Janko Dorosiev*, el Koprivŝtica, eksinstruisto, ekssekretario de kompartio en Sofio, persekutata de policistoj, vidante ke li estos kaptita, sin mem mortpafis.

Okaze de tiuj mortigoj sekvadis multaj arestoj.

Kiel reakcio de tiuj teruraj persekutoj ofte aperas en arbaroj revoluciaj bandoj, inter kiuj estas ankaŭ virinoj. Tio estas rimarkinda. Malgraŭ ĉio, la bildo ne estas kompleta — ĉar kio okazas en la vasta provinco, for de nia vido, ni ne povas scii ĝuste.

Videble estas, ke la bulgara Nerono — Cankov, estas ĉe sia fino. *Ardin.*

## KORESPONDEJO

Al ĉiuj sendintoj de gratuloj okaze de 1. majo ni dankas ĉi tie publike. *Red.*

*Voko.* Vian pseŭdonimon jam uzis alia k-do (Leipzig-ano)! Via art. estas iom longa. Se spaco permesas, ni uzos.

*2474.* Ideo de via art. estas bonega. Sed troas gramatikaj kaj stilaj eraroj. Krome spaco verŝajne mankos pro abundeco de aktualaj raportoj.

*Kronikistoj kaj aliaj.* Pro material-abundeco ni devis prokrasti viajn raportojn, kiuj certe aperos.

*3398.* La italan rap. mi certe uzos. La via estas iom neklare konceptita.

*N. J. Ĥolm.* Ni kontentigos vian deziron en unu el venontaj n-oj. *Red.*

## Lernejoj en Italio

Ĵus oni faris enketon pri la kondiĉoj de la popolaj lernejoj en la industria kaj terkultura regiono Lombardio, kiu estas unu el la plej riĉaj partoj de Italio. Oni enketis pli ol 300 lernejojn en la antaŭurbo de la regiona ĉefurbo Milano, kaj en la apudaj distriktoj de Lodi, Saronno, Monza, Codogno, Gallarate kaj Seregno (elparolu *z* kiel *c*, kaj *gn* kiel *nj*: akcentu kiel esperante). Jen estas la rezultoj:

1) 40 proc. el la lernoĉambroj estas malgrandaj, mallumaj, senaeraj, malpuraj, kun malkomfortaj kaj malnovaj benkoj.

2) 55 proc. el la lernejoj havas senakvajn necesejojn, ofte apudajn je la lernoĉambroj aŭ kune uzendajn de aliaj kunloĝantoj.

3) En 75 proc. el la komunumoj, la kunlaborado inter la instruistoj kaj la lernantgepatroj tute malestas.

4) 90 proc. el la komunumoj neniel prizorgas la mense aŭ korpe nenormalajn geknabojn.

5) En 99 proc. el la komunumoj ne ekzistas monpremioj por la plej diligentaj gelernantoj.

6) En 60 proc. el la komunumoj ne ekzistas "rikreatorioj" (t. e. knabhejmoj, knabamuzejoj). En 30 proc. ekzistas religiaj amuzejoj; nur en 2 proc. (pli precize, en 5 el la 303 enketitaj) ekzistas laikaj amuzejoj.

7) En 70 proc. el la komunumoj ne ekzistas porlernantaj helpinstitucioj, en 95 proc. la t. n. "bonfarada kongregacio" neniel helpas la lernejon.

8) En 99 proc. el la lernejoj ekzistas nek dentkuracado, nek pluvbanoj; en 55 proc. oni ne havas kuracistvizitadon; en 70 proc. oni ne aranĝas la someran sendadon de la gelernantoj al maraj, en 80 proc. eĉ al ordinaraj (klimataj) kuraclokoj.

9) 90 proc. el la lernejoj ne havas gimnastikejon.

Iu instruistino sciigis, ke en ŝia lernejo la akvotubaro ne funkcias dum 9 monatoj (en la jaro), kaj dum la aliaj ĝi alportas nur malbonodoran akvon; alia ke la lernejdomo estas tiel malnova kaj malforta, ke ĉiam oni timas pri ĝia falo.

Tiaj lernejoj estas, kompreneble, malŝatataj de la geknaboj, kiuj, male, tre volonte aliras al la malmultaj modernaj lernejoj. *Italano.*

## DIVERSAĴOJ

### Sindikata movado

En Britio estas movado por instigi unuecon inster la Unuiĝoj Metiaj. La sekvantaj ciferoj, elĉerpitaj el "The Worker", klare montras la disan staton de la Brita Unuiĝa Organizado, kaj ridindigas la akuzon de „disfenda politiko" kiun celdirektas unuj gvidistoj kontraŭ aliaj pli agemaj.

En Britio troviĝas 1,135 metiaj unuiĝoj kun proksimume 5 000 000 da membroj. En la metala industrio estas 52 unuiĝoj havantaj de 200 ĝis 240 000 anojn en la plej granda. 16 unuiĝoj servas al la konstruistoj, 14 al la presistoj.

La kotona industrio kaj la teksistoj havas 52. Unuiĝo el tiu ĉi grupo havas frapantan nombron de 104 anoj. La fervojistoj estas disigitaj per multaj unuiĝoj kiuj funkcias por diversaj metioj.

La transportistojn servas 9 unuiĝoj kiuj ampleksas de 300 — ĝis la plej granda — 300,000 anoj.

Ĉiu unuiĝo enhavas propran bandon sian de oficialuloj, siajn apartajn politikon kaj demandojn; kaj ĉiu emas ŝtelĉasi la membrojn de alia.

La artikolo komparas tion kun la 22 unuiĝoj de Sovet-Rusio por 6 300 000 laboristoj organizitaj, kaj konkludas per alvoko al ĉiu agemulo en iu ajn lando subteni tiujn gvidantojn kiuj stariĝas por la militkrio

*"Nacia kaj Internacia Unueco"*

*1242.*

### En granda mizero

troviĝas nia k-do *Josef Ŝvarc*, Teplicka tr. 35, *Most*, Ĉekoslovakio, kiu verkis por "S" (n-o 27) raporton pri la malbona vivo de laboristaro en ĉekoslovaka mindistrikto. Antaŭ kelka tempo li pagis sian abonsumon por „S" kun la rimarkigo, ke li prefere malsatus dum du tagoj plene, ol ke li devus malhavi "S". Li skribas: "Mi perlaboras semajne nur iom pli ol 50 kĉ, ĉar mi laboras nur 2½ tagojn. Ĉar mi devas pagi por loĝo kaj manĝo semajne 110 kĉ, mi jam delonge ne tagmanĝis, nur manĝas sekan panon. La ĉi-tieaj minejposedantoj volas senlaborigi 14—15000 laboristojn. Mi timas, ke ankaŭ mi estos inter tiuj, ĉar estas certe, ke neniu naciisto fariĝos senlabora, kaj tiaj estas ĉi tie tre multaj. Tial mi jam vendis kelkajn aĵojn, por ke mi almenaŭ vivu."

Certe troviĝos inter la SAT-anoj la helpemuloj, kiuj subtenos tiel- aŭ alimaniere nian suferantan kamaradon! Montru proletarian solidarecon!

### Peto!

Gek-doj ĉiulandaj, sendu al ni Esp.-aĵojn por aranĝi grandiozan ekspozicion kaj per tio revigligi la ĉi tiean movadon.

La Dresdena Laborista Esperantistaro havas multe da ŝuldoj, per la kulpo de la lernejoficejo. Por forigi ilin, ni aranĝos loterion efikotan per donacoj de ĉiuj gek-doj kaj simpatiuloj. Gek-doj, vi ĉiuj estas petegataj subteni nian entreprenon per gajnindaj donacoj aŭ monsendoj, por ke la ĉi tiea movado ne pereu!

Tutkoran antaŭdankon!

La sendaĵojn adresu jene: Satanaro Dresden, Fako: Administrejo, Reinhold Lehmann, Dresden 6, Förstereistr. 25 (Germ.)

### Koran Dankon

al ĉiuj kamaradoj, kiuj dum mia mallibero esprimis por mi ilian kamaradecan, ĉu leteran ĉu engazetan kunsenton kaj simpation. Eninter la muregoj malliberejaj ĝi estis por mi la plej agrabla konscio pri la vera vivo de nia Ruĝ-Verda Internacio kaj la plej bela instigilo al laboro pli intensa ol ĝis nun por nia Asocio. — La k-doj-korespondantoj miaj bonvolu paciencigi je respondo, ĝis nun neebla pro malsaneco — kaj skribi al la nova adreso: ul Króla Leszczynskiego, n.o 36 - m. 2. — Lublin *J. Zavada.*

**VARBU novajn abonantojn! Varbu novajn membrojn! Aliĝu al la Va Kongreso!**

# DISKUTEJO

## Ĉirkaŭ la projekto Dawes

### Konkludo de diskuto

I

Estas strange ke projekto senkompare sklaviga kaj kontraŭproletaria povas trovi defendanton en klaskonsciaj proletariaj vicoj — en la SAT-anaro. K-do 300 opinias, ke mia pritrakto de tiu temo estis "bedaŭrinde tro unuflanka". Jes certe, ĝi estis unuflanka, ne "bedaŭrinde" unuflanka, kamarado 300, sed *feliĉege unuflanka,* kiel decas al SAT-ano! En nia epoko de plej akrigitaj ekspluatado kaj subpremo, de batalado inter la klasoj, *necesas esti unuflanka,* ĉar oni ne povas stari samtempe ĉe ambaŭ flankoj de la socia skalo. Estante proletario, mi rigardas ĉiujn okazaĵojn kaj faktojn laŭ la vidpunkto de *interesoj de mia klaso* La proletariaro malbezonas "objektivecon", kiu volus konsideri la faktojn samtempe el vidpunktoj proletaria kaj burĝa. SAT mem estas produktaĵo de unuflankaj, tio signifas de proletariklasaj konsideroj: ĝi estis kreita kiel *klasa organizaĵo* de la proletarioj apartiĝintaj de la burĝa esperanto-movado.

K-do 300 penas pruvi ke la Dawes-projekto efektive ne estas tiel ruiniga kiel mi ĝin prezentis. Li elmontras, ke la senŝtatigo de la regnaj fervojoj, la plialtigo de la fervojtarifoj, limdepagoj kaj impostoj havos malpli gravan efikon ol mi antaŭvidis: ke la financkontrolo estos sen graveco se Germanujo plenumos la ripardevigsumon". "Se Germanujo plenumos"... tio signifas, se la germana *proletariaro,* la *tutmonda* proletariaro donos siajn ŝviton kaj sangon en pliigita ekspluatado. "Sen graveco"...? Ĉu vere estas "sen graveco", ke en Germanio pro la Dawesplano la okhora labortago jam estas fakte kaj leĝe forigita, ke la salajroj estas ridinde malaltaj, ke laboristoj po miloj estas en malliberejoj? "Sen graveco" — ke proletarioj malsatas, frostas, suferas por pligrandigi la Dawesprofitojn de siaj premantoj? Dank al la pliakrigita ekspluatado de la germana laboristaro, la vivkondiĉoj de la alilandaj salajruloj ankaŭ malpliboniĝas. Tio, kion mi en miaj artikoloj en aŭtuno antaŭdiris, *jam nun fariĝis fakto:* Jam anoncas la ekonomiaj bultenoj, ke la industrio de Britujo, Ĉekoslovakio kaj de aliaj industriŝtatoj ne povas konkurenci la germanan industrion pro ties malaltigitaj produktadkostoj (ĉar la ekspluatgrado de la germana proletariaro estas treege pli intensiva). Sekve de tio la senlaboreco grandiĝas en la nergermanaj landoj. En Aŭstrio, kies loĝantaro estas 6 milionoj, mallaboras preskaŭ 250 000 homoj! La unuan fojon depost 1914, en Francio komencas regi senlaboreco. Jam la britaj ŝipkonstruentreprenistoj proponas al siaj dungitoj malplialtigon de la salajroj. Ĉu ĉio tio estas vere "sen graveco"?

K-do 300 citas eltranĉaĵon el artikolo de k-do Varga, kiu diras, ke la Dawes-projekto prokrastos la ripeton de la akuta situacio de 1923. Kial k-do 300 ne citas ankaŭ la artikolpartojn, kie Varga parolas pri la ŝarĝoj, kiujn la proletariaro devas porti dank' al tiu plano?

II

K-do 300 plektis en siajn artikolojn multe da citaĵoj de Karl Marks. Sed la spirito de liaj verkaĵoj, tio, kion li mem skribas, estas la kontraŭo de l' marksismo.

La sorto de la proletariaro estas, laŭ lia opinio, "intime ligita kun tiu de l' burĝa ŝtato", kaj se la imperialistaj rabistoj de l' Antanto parolas "amikece kaj akordeme" kun la ŝtatreprezentantoj de la germanaj ekspluatistoj, tiu fakto "pezas eĉ por la laboristaro". Laŭ Karl Marks, la demokratia ŝtato — kiun k-do 300 tiel admiras — estas "komitato administranta la aferojn de la kapitalista klaso". Karl Marks al ni diris, ke "la proletarioj ne havas patrujon". Se la sorto de la laboristaro estas intime ligita kun tiu de l' burĝa ŝtato, ĝi estas ligita nur en tiu senco ke ju pli firmiĝas la burĝa ŝtato, des pli malprosperas la proletarioj. Karl Marks opiniis ke la burĝa ŝtato estas *detruenda,* kaj li tiun ideon klare esprimis en 1871 okaze de la Pariza Komuno, kie la laboristaro detruis la burĝan ŝtatmaŝinon. Tiam Thiers kaj Bismarck, la gvidantoj de la francaj kaj germanaj ekspluatistoj, komune agis por venki la heroajn batalantojn de la laboristaro kaj por restarigi la burĝan ŝtatmaŝinon detruitan. Dirante ke "la sorto de la laborista klaso estas intime ligita kun tiu de l' burĝa ŝtato", K-do 300 maldistingis la opinion de Karl Marks kaj tiun de la blankgvardiestroj Bismarck kaj Thiers.

K-do 300 klopodas pruvi, ke la burĝaro estas "*granda*" klaso de la socio. Li simple diras ke la koncentriĝo kaj amasiĝo de la kapitalo en ĉiam malpli da manoj kaj de la proletariaro en ĉiam kreskanta multnombro ne estas ankoraŭ "tiel disvolviĝinta". K-do 300 ŝajnas nescii ke malgranda kliko de grandaj industrimastroj kaj de financestroj direktas la tutan politikon, li ŝajnas neniam esti aŭdinta paroli pri Rockefeller, Morgan, Stinnes k. c. Ĉu li neniam aŭdis ion pri trustoj, karteloj, "koncernoj" ktp.? Nur ili direktas la burĝan politikon laŭ sia volo. Kaj la "enmezaj tavoloj" de la socio? Estas ridinde diri ke ili apartenas al la kapitalista *klaso* — eĉ se partoj el ili ankoraŭ estas blindaj kaj ne rekonas siajn interesojn; ili tamen estas ekspluataj de la grandaj rabistoj.

Ankaŭ la memiluziĝo de k-do 300 pri la "venko de l' spirito kontraŭ la sabro" estas pure kontraŭmarksista. Spirito certe estas necesa kiel armilo en la liberiga batalo de la laboristoj, sed spirito sola ne sufiĉas. La "pura spirito" respublikema ne estus sukcesinta venki en marto 1920 la reakcian, monarĥistan Kapprevolton sen la apogo de la maŝinpafiloj de la ruĝaj, laboristaj militistaroj. K-do 300 opinias, ke Karl Marks "tute ignoris la maŝinpafilojn, kaj nur kredis je la sana spirito"... Certe, Karl Marks ne konis la modernajn maŝinpafilojn, ĉar li mortis antaŭ oni ilin uzis, same kiel li ne konis Zeppelinojn kaj aeroplanojn. Sed se li nun vivus, li sendube ne apelacius al la "sana spirito" de k-do 300 por ion ekscii pri ilia uzo kaj utiligo en la klasbatalo.

III

K-do 300 plendas, ĉar K-do 1187 nomis lian vidpunkton neproletaria. Sed kiel oni rajtas nomi vidpunkton de tiu, kiu trovas ke "Rusio certe subiĝos al influoj privat-kapitalistaj, *ĉar ĝiaj subteraj trezoroj postulas esti utiligataj*". Tiu frazo klare kaj logike esprimas, ke k-do 300 povas imagi utiligon de subteraj trezoroj *nur per privata kapitalo.* Kiel nomi pensmanieron kiu tute ne kapablas imagi, ke naturtrezoroj povas esti utiligataj ankaŭ *alimaniere ol per privata mastrumado?*

K-do 300 demandas: "ĉu vere necesas" — al Sovetlando — "koalicioj kune kun ĉinaj generaloj, reakciaj despotoj..."? Li dezirus scii ĉu "streĉoj imperialistaj" estas "proleta eksterpolitiko"? Li diras ke Sovetujo eble baldaŭ formos blokon kun la monarĥa Japanio militista. K-do 300 ŝajnas opinii ke la gvidantoj de la sovetaj ŝtatoj emas koalicii kun militarismo kaj reakcio, sed tamen ekzistas diferenco inter ili kaj tiu prezidanto de l' Germana Respubliko demokratia, kiu en oktobro 1923 promesis kaj ordonis la atakon de la monarĥiema militistaro kaj oficiraĉaro kontraŭ la ruĝa, socialista Saksio. Certe, estas necese konkludi, por la protekto de la laborantaj masoj de Sovetlando, pacon kun la najbaraj ŝtatoj, eĉ se ili estas reakciaj, ĉar la popolo de Sovetio bezonas nun pacon por labori.

Se Sovetio deklarus militon al Japanio, k-do 300 certe ekkrius: "Soveta imperialismo!" Ĉar Sovetio faras pacon kun Japanio, li parolas pri "imperialistaj streĉoj". Nek paco nek milito trovas lian aprobon. Kion do devus fari Sovetio por lin kontentigi? Eble memmortigon?

Sovetio ne bezonus kompromiseti kun Japanio se la politikaj amikoj de k-do 300 en la tuta mondo, anstataŭ kalumnii Sovetion kaj eksciti la proletariojn kontraŭ ĝin, ĝin helpus kaj apogus.

K-do 300 certe scias ke Ĥinio kaj Hindio estas ekspluatataj kaj subpremataj de la grandaj imperialistaj potencoj okcidentaj. Ĥinio estas duonkolonio, Hindio estas kolonio de la financestraro tutmonda. Subteni tiujn landojn kontraŭ la rabistoj, signifas batali por la subpremataj masoj, kontraŭ subpremo, kontraŭ kapitalismo kaj imperialismo. Ekzistas du formoj de proletaria eksterpolitiko: Mac Donald jetigis el aeroplanoj bombojn sur la pacajn vilaĝojn de la kolonipopoloj; Sovetio defendas la koloniojn kontraŭ tiaj kapitalistaj metodoj. Kiu eksterpolitiko estas pli proletaria?

K-do 300 ĝis fino de sia vivo vane atendus la socialismon, se la proletaria eksterpolitiko de Sovetio ne malfortigus la kapitalistajn ŝtatojn, ne plipotencigus la klasbatalon de la proletarioj de la kapitalistaj landoj — per revoluciigo de la kolonioj.

Argumentoj kiel tiuj de k-do 300 ne kondukas al la vojo de la posteuloj de Karl Marks, sed al tiu de la adorantoj de Bismarck kaj de Thiers. *Lucien Revo.*

# KRONIKO

**Ĉekoslovakio.**

*Holeischen.* Kurso malfermita en popola lernejo por komencantoj kaj progresintoj. Partoprenas laboristoj, oficistoj kaj studentoj, entute 15 p. Gvidas k-do Schweinfurter. *4102.*

**Hungario.**

La esp. sekcio de la grupo de la "Naturamikoj" en Ujpest deziras oficialan interrilaton kun la alilandaj esp. sekcioj por povi pli rezulte propagandi por nia movado. La sekcio kiu havas 20 membrojn, spertis tre favoran akcepton de esp. en hungarl. naturamika movado. Ĉiuloke la naturamikoj kunlaboras kun la esp-istoj, kursoj komenciĝas. Lastokaze ankaŭ la centra sekretario k-do Brumiller, eklernis esp., laŭ kies instigo la hungarl. "Naturamika Asocio" proponos dum la tutmonda kongreso la oficialan alprenon de esp. Fratoj! Helpu ni unu la alian! Sendu korespondaĵojn al *Sandor Jos.*, Erzsebet-u 43, *Ujpest.*

**Italio.**

Ankaŭ en Italio oni starigis la Komfrakcion el membroj de SAT. La interesiĝantaj k-doj bonvolu peti la adreson pere de la partia "interna vojo".

**Polio:**

*Lublin.* La en n-o 10 de "Sennaciulo" menciitajn kursojn ĉe la Lublina kooperativo finis sukcese 12 personoj, la arestitan gvidanton de ĉi-kursoj (K-don Z.) bone kaj ofereme anstataŭis k-do Halpern. — Por ĉi-kursanoj la Lublina filio de "Laboro" komencas nun organizon de meza kurso, kiun parton prenos ankaŭ la malpli perfektaj absolvintoj de antaŭ-lastjaraj kursoj. — Antaŭ la proceso de Lublinaj Kooperativistoj, al kiuj apartenis ankaŭ nia k-do Z., la ĉitiea t. n. "neŭtrala", sed envere ŝovinista loka grupo de "Pol-E Anoj" publikigis en la loka gazeto deklaron, el kiu ni citu la jenajn frazojn: "Ni havas nenion komunan kun la kursoj de Esperanto, estantaj ĉe la Lublina Kooperativo — kaj ankaŭ ne estas respondeblaj pro tiuj Esperantistoj, kiuj uzas la lingvon Esp. por siaj politikaj aŭ partiaj celoj." —

En niaj politikaj rilatoj tia deklaro estis nenio alia, ol nur simpla, ordinara, kaj krom tio falsa *denunco.* (Ĉar k-do Z. estas konata senpartiulo). Sapienti sat! (sufiĉas al saĝulo).

**Sovet-Unio.**

*Ĉita (Orienta Siberio).* En komenco de marto ĉi-tie organiziĝis SAT-grupo el 8 gesatanoj. Ĉiusemajne oni havas regulajn kunvenojn (ĉiudimanĉe je la 4a posttagmeze). La grupo celas studi kaj pridiskuti "Sennaciismon" kaj diversajn SAT-demandojn, organizi kaj pliviglígi tradukadon el "Sennaciulo" kaj por ĝi, kaj ankaŭ pliviglígi SAT-propagandon en Ĉita.

La grupo konsistas preskaŭ tute el gejunularo, sed tamen laboras vigle kaj laŭplane. Dum la kunvenoj kaj oftaj reciprokaj interrilatoj la gegrupanoj uzas ekskluzive Esperanton. *K. F. kaj V. B.*

— Ĉito havas iom pli ol 80000 loĝantojn (antaŭ revolucio ĝi havis nur 45000 loĝ.) kaj estas centro de nia movado en ekstrema oriento. La movado ĝojige kreskas. SAT-grupo (vidu supre) konsistas el plej agemaj kaj konsciaj esperantistoj kaj la grupo emas plukreski. Oni devas konstati ke ĉie en Siberio tiel nomataj neŭtraluloj montras sin kiel velkemaj abstraktuloj, kiuj ĉiam kaj kun ĉio konsentas. Ili estas mirinde bagatelema popoleto, kiu ŝajne ekzistas nur por ĝui sonojn de parolo kaj por akordigi movojn de lango kun movoj de piedoj en dancoj kun fraŭlinoj. Ĉito havas nun 115 registritajn esperantistojn. El ili 70 estas fluparolantaj. Plejparte ili estas studantoj — filoj de malriĉaj laboristoj, vilaĝanoj kaj oficistoj.

En marto ili decidis fondi en Ĉito organizaĵon de *Sovetlanda esperanta Unuiĝo* kaj elekti komitaton por tuta gubernio. La movadon gvidas junaj instruistoj Baĵenov, Usolcev kaj aliaj. — Nova generacio estas pli inklina al novaj ideoj kaj movadoj. Inter maljunuloj (eĉ inter komunistoj aŭtunaĝaj) nia laboro estas nature vana. Propagandistoj, notu ĝin bone!

Lastatempe esp. en Ĉito disvastiĝas inter instruistoj de *elementaj* lernejoj (unua ŝtupo). Instruistoj de superaj lernejoj nature estas surdaj al nia movado (ja diplomitaj kleruloj estas spirite sklavigitaj de malnova burĝordo, kiu malemas komunigi laborilojn kaj lingvojn). Oni devas noti jenan imitindan fakton. Studantoj de laborista fakultato en Ĉito antaŭ kelkaj monatoj unuanime kaj tutamase rifuzis lerni malfacilan anglan lingvon, kiun trudis al ili estraro. Anstataŭ malfacila kaj stultiga fremda lingvo ili postulis Esperanton 50-foje pli facilan. Kaj la estraro . . . cedis. Kresko de nia movado ne eblas sen konfliktoj kun malnovanoj. *M. Krjukov.*

*Irkutsk.* Esperanta Societo tie ĉi estis fondita ĝuste en jaro de revolucio, en 1917. Kiel ĉie esperanto en la urbo disvastiĝas precipe inter junularo. "Duonkleruloj" pli inklinas al nia ideo, ol tiel nomataj kleruloj pro ega simpleco kaj facileco de nia lingvo. "Kleruloj" povas lerni malfacilajn fremdajn lingvojn ĉar havas multe da mono kaj da tempo senokupa. Sed ne forgesu, ke "duonkleruloj" nature devenas el proletaro, kiu kleriĝas nur per "kupra mono". Malriĉaj studantoj Juskoviĉ, Lesnikov kaj Majzlis fondis en irkutska universitato (kiu nun havas pli ol 2000 studantojn) Satgrupon. Ĝi havas ĉiujn ŝancojn per kreski. Sed la movado havas pli bonan sukceson en nesuperaj lernejoj inter junaj lernantoj 14—17-jaraj. Mi notu jenan fakton, kiu devas havi ne absolutan, sed principan signifon. Spite al insistoj de "aŭtoritataj" instruistoj negranda grupo da lernantoj en lernejo de Lomonosov (Panasjuk, Poluŝin, Isaĉenko, Suĥov kaj 3 aliaj) sukcesis ŝovi sian "numeron" en oficialan vesperon dediĉitan al memoro de parizaj komunistoj (18. marto). Ili faris raporton pri lingvo intern., akorde kaj vigle kantis veran "Internacion" en nia sennacia lingvo, deklamis versojn kaj sennaciecajn proverbojn kaj laŭte hore kriis saluton al parizaj komunistoj: "ni daŭ-rigas vian faron ktp." La instruistoj de la lernejo poste diris, ke la numero estis plej sukcesa en la vespero ĉar ĝi spiris neatenditan freŝecon kaj novecon. Baldaŭ oni devas atendi en la lernejo "ribelon" de lernantoj, kiuj postulos enkondukon de esp. anstataŭ stulte malfacilaj fremdaj lingvoj. *M. Krjukov.*

*Kievo.* 2. nov. estis oficialigita Kieva gub. fako de SEU. Gubkomo estas konstruita en 4 sekcioj: 1. Organiza (k-do Fedotov). 2. Pedagogia (k-dino Lisiĉnik). 3. Interlig-Informa (sama). 4. Studenta (k-do Skulenko). K-do Devjatnin reprezentas regnajn esp. kursojn, tri k-doj la Kievajn superajn lernejojn. En K. esp. nun vigle disvastiĝas. Funkcias sekvantaj grupoj: 1. en Politeknika Instituto. 2. en Elektra Teknikumo. 3. ĉe Instituto de Popola Klerigado kaj ĝia laborfakultato. 4. ĉe 47a laborlernejo. 5. ĉe konservatorio. 6. ĉe blinduloj kaj invalidoj. Grupoj estas organizitaj en Fastovo, Ĉerkasi kaj eĉ en vilaĝo Fkarooka. Interrilatoj ekzistas kun Beloja-Cerkov kaj Ĉernigov. Gubkomo entreprenas nun grandan laboron inter Kieva junularo kaj pioniroj. La interligsekcio petas ĉiujn junulajn aŭ profesiajn organizaĵojn dezirantajn interligiĝi kun konformaj Kievaj organizaĵoj sin turni al k-dino Lisiĉnik laŭ adr. Gubkomo de SEU, Fenokekleevskaja 32, kv. 23. Pri rezultoj de laboroj ĉe junularo sekvontan fojon. *I. L. (3632).*

*Minsk.* 1-a Minska distrikta konferenco (Blankrusio) de esp-istoj organiziĝis fakon de l'internacia laborula kunligo. Ĉefa celo de tiu ĉi fako: evidentigi praktikan uzeblecon de espo por revolucia soveta proletariaro. Ĉiuj esp. kaj neesp. lab. org-ajoj sendos siajn poŝtaĵojn en nomitan fakon kaj tiu ilin tradukos kaj sendos laŭcele. Nia tasko inokuli al ĉiuj lab-istoj kaj lab. org-ajoj bonan kutimon — korespondadi kun eksterlando kaj por afero de liberigo lab-ista, faros pli grandan sukceson, ol eĉ gazetoj kaj montroj da flugfolioj. Ni petas ĉiujn esp-istojn: sendu al ni adresojn de lab. org-ajoj, korespondantaj, junulaj, partiaj, profesiaj ktp., sendu art. pri via vivo kaj al. ajoj. Ni estos niaflanke farantaj la samon. Nia adreso: Sovet-Unio, *Minsk,* Leningradskaja 6, Minska distrikta komitato de SEU, *P. Kirjuŝin (4425).*

9. apr. okazis distr. konferenco de lokaj esp-istoj. Ĝi sendis telegramojn al multaj rev. org-ajoj sovetaj kaj internaciaj. Tutblankrusia konferenco okazos. 28. majo.

*Taŝkent.* Taŝk. SAT-grupo enhavas 109 membrojn (aktivaj 14, aspirantaj — 84, subtenantaj — 11). Komitatanoj: k-doj Sokolov, Koblov, Egorov. Kunvenoj merkrede (ripoztago en Uzbekistan), dufoje dum monato. Dum tiuj kunvenoj oni faras raportojn diverstemajn: SAT kaj UEA, Kiel rilatas marksistoj al lingvo intern., esp-movado tutmonda, ĉu bezonas espon kompartio, komjunularo, pioniroj ktp. Dum la ĝenerala kunveno (3. 4.) oni decidis aranĝi SAT-semajneton por SAT, propagando kaj varbado de novaj membroj. Dum tiu semajno ĉiu grupano devas peni varbi 3 personojn. La varbado okazas laŭ certaj instrukcioj. Por lokigo en la murgazetoj de siaj org-ajoj, la k-doj ricevas skribmaŝine presitajn raportojn. Ĝis nun Taŝk. SAT-anoj aĉetis pere de la grupo akciojn de Eldon-Kooperativo por 36 dolaroj. *K. K.*

# Radio

### (Neŭtrala movado)

Nian legantaron interesos certe ekscii, ke dum la Kongreso de amatoroj de Radiotelefonio, okazinta en Paris, de la 14. ĝis 18. de aprilo, estis voĉdonata dezirespimo por la enkonduko de esperanto. Notinde estas, ke kvar proponoj estis submetataj al la Kongreso pri la lingva temo: unu por la angla lingvo, alia por esperanto, tria por ido kaj kvara por interlingua. Post longa kaj vigla diskuto la poresperanta propono estis akceptata preskaŭ unuanime.

### Esperanto kaj radio

*Dresden.* La Radio- kaj Esperanto-unuiĝoj[1]) kontraktis jenon:

1. reciproka korporacia aniĝo, 2. reciproka kotizo de sama alteco, 3. reciproka publikigo de unuiĝaferoj kaj aparte gravaj sciigoj, 4. reciprokaj kursoj kaj paroladoj, 5. reciproka liverado de po 2 ekzempleroj de la fakgazetoj, 6. pluaj reciprokaj liveradoj de gazetoj je esceptaj kondiĉoj, 7. peras la Esperanto-unuiĝo al la Radio-Stacio, helpe de eksterlandaj interrilatoj, radio-jurnalojn el la tuta mondo. (Laŭ: "Der Sächsische Funk" [18] H. Wotschke-Dresden).

1) Neŭtralaj (burĝaj).

**Rezolucio pri Lancucki, Pola Parlamentano, kaj gvidanto de la Fervojaj Laboristoj**

*(sendita de Laborista Esperanto-Klubo, London, al la pola ambasadoro en London, la ministroj de justeco kaj de eksteraj aferoj en Varsovio).*

La Laborista Esperanto Klubo (Londono) atente sekvis la juĝon kontraŭ kamarado Lancucki, Parlamentano el la laborista klaso kaj gvidanto de la Fervojaj laboristoj, akuzata je perfido kontraŭ la ŝtato, *protestas* kontraŭ tiu ĉi persekutado en la nomo de la Brita Laborista klaso, kaj postulas lian tujan liberigon el malliberejo.

Ni protestas plie kontraŭ la ago de la Pola Registaro kiu rifuzas, ke Brita advokato prizorgu lian defendon kaj postulas, ke tiu ĉi rifuzo estu retirata kaj, ke Brita advokato estu permesata veturi al Pollando.

*E. Edwards*
Prezidanto de kunveno.

# RECENZEJO

**Gazetoj**

**Represis artik. el S.:** *Pravda,* Plzen, 31. 3., Japan-sov. traktato (S. 24), *A Internacional,* Lisboa, 4. 4., faŝismo en Bulg. (S. 25). *A. Világ,* Targu-Mureŝ, 4. 4., Kaŭĉ. imper. (S. 13). *Le Journal du Peuple,* Paris, 11. 4., Let. el Argent. (S.23). Hung. tabeloj (S.24) [ne menciis deven]. *Socialista,* Praha, 28. 3., klasjust. en Germ. (S. 19).

**Enpresis div. notojn:** *Molodoj Proletarij,* Kiev, 1. 4. art. pri esp. kaj junularo, *Le Semeur du Norm.,* Caën, 8. 4., recenzo de Lanty-broŝuro, *El Socialista,* Madrid, 31. 3., bona art. pri SAT.

**Homaro,** I. kajero. Neabonebla, nur aĉetebla; specimeno 1 resp.-kupono, 50 spec. 5 sv. fr. Adr. Julio Mangada Rosenörn, Glorieta de Bilbao, 5. *Madrid,* Hisp.

Enhavas sur 20 paĝ. de form. $10^1/_2 \times 15$ cm. deklaracion pri "homaranismo" kaj kelkajn literaturajn fragmentojn. La celo de la kajeroj estas, propagandi homaranismon, la religian ideon de Zamenhof.

# SAT je servo de Scienco

Mi laboras en mia kemia-mikrobiologa laboratorio pri rapida evoluigo de grena fungo "Fusarium", kiu estas kaŭzo de grava malutilo en kampa mastrumado. Ĉi tre malgrandigas kvanton da semoj de sekalo, aveno, tritiko, lino, ktp. En 1923 la domaĝo estis 40 milion. pudoj (1 pudo = 16 kg).

Tiu-ĉi fungo tre interesas min pro sia *malkonstanteco* en ekstera formo, strukturo kaj grando de siaj semoj (konidioj). Mi opinias, ke tiuj diversaĵoj estos pli grandaj se mi prenas la fungon el diversaj landoj. Mi ne sukcesis per franca kaj germana lingvoj.

Mi tre petas ĉiulandajn kamaradojn

1. sendi al mi 10—20 gramojn da ĉiu el jenaj semgrenoj: sekalo, tritiko, aveno, lino
2. rilatigi min kun mikrobologia aŭ mikologia aŭ fitopatologia laboratorio de via urbo aŭ regiono
3. informi min ĉu oni povus ricevi natursciencan literaturon el via lando (speciale botanikan, fitopatologan, mikologan, mikrobiologan kaj similajn ĵurnalojn, revuojn, verkojn) kaj kion mi devas fari por ĝin ricevi (abonpago ktp. . . .).

Miaj kamaradoj fitopatologoj diras, ke ili forte dubas, ke "el mia esperantista entrepreno" estos io reala. Ili opinias, ke per esperanto scienca laboristo nenion povas atingi. Mi pensas ion alian kaj estos tre ĝoja se mi ricevos iom "realan" respondon.

*M. S. Dunin,* ul. Gercena d. 14 A, kv. 21 *Moskvo* (Ruslando).

# V. Kongreso de SAT

## Wien, 11.—15. aŭgusto 1925

**3. komuniko**

La k-doj *V. Krstulovitz* kaj *M. Gattyan* (Wien) estas ankaŭ membroj de la K. K.

*Kongresadreso.* Jos. Slezak, Wien XX., Ospelg. 34/25.

*Kongreskotizo.* La simpla membrokotizo de SAT por la diversaj landoj. Senlaboruloj, post atestita senlaboreco, pagas la duonon. *Pago:* per naciaj monbiletoj en registrita letero.

*Aliĝo:* Validaj estas nur aliĝoj akompanataj de la kotizo. La aliĝilon tekstu legeble laŭ jena ordo: 1) familia nomo, 2) antaŭnomo, 3) aĝo, 4) profesio, 5) strato kaj n-o, 6) urbo 7) provinco, 8) lando, 9) SAT-membromatrikulo'

# Skizoj pri nacia kaj kolonia problemo

*G. Brojdo* (Daŭrigo)

En Kaŭkazo dum la cara epoko ni observas la naciecajn interrilatojn inter armenoj kaj tataroj, kiu estas respegulo de la konkurado, batalo inter la armena kaj la naskiĝanta tatara burĝaro. Kun akriĝo de tiu ĉi batalo ĝi transformiĝas en ŝovinismon, lasantan neniun proksimiĝon inter armenoj kaj tataroj, kaj en la plej akraj momentoj la burĝaro venigas ĝis la senpera sanga interpuŝiĝo inter ambaŭ nacioj. La ambaŭ flankoj efektivigas la ofensivan naciecan politikon. Sed antaŭ la grandrusa nacia burĝaro, posedanta pli potencan kapitalon, armita per ŝtata aparato kaj armeo, la armena kaj ankaŭ la tatara burĝaro efektivigas la politikon de defenda naciismo, naciismo de malfido, enfermiteco kaj foriĝeco. Paralele al penetrado de grandrusa kapitalo, kaj sekve, de burĝaro kaj de ĝiaj komizoj, ĝiaj armeoj ktp. en Turkestanon, la juna uzbeka burĝaro enfermiĝas en la komplikan sistemon de defenda naciismo. Ĉio sia, "nacia": lernejo, moroj ĝis kostumo, speciala ĉapo (tjubetéjka) sur la kapo — estas rimedo por konservi la "nacian vizaĝon", t. e. la sola rimedo kontraŭmeti al la ofensivanta grandrusa kapitalo enfermitan "sian" merkaton kun "siaj" apartaj bezonoj. La ofensivanta grandrusa kapitalo renkontas tiom fortan reziston, ke ĝi estas devigata konkiri la merkaton per la ĉirkaŭvojaj rimedoj.

Paralele kun la tuta vico de senperaj agoj el la sistemo de ofensiva naciismo (okupo de komandantaj postenoj, batalo kontraŭ la organoj de loka memadministro, kulturado de urboj kaj vilaĝoj kun grandrusa loĝantaro, batalo kontraŭ loka lernejo ktp. ktp.) ĝi altiras por kunlaborado la lokan komercan procentegistan burĝaron, transformante ĝin en la interestantan aparaton inter la grandrusa kapitalo kaj uzbeka vilaĝo. En interesoj de tiu ĉi ekonomia konkirado, la grandrusa burĝaro produktas varojn, kiuj konformas al naciaj gustoj kaj bezonoj (moskva tekstila industrio produktas ŝtofojn kun turkestana desegnaĵo, estas produktataj specialaj turkestanaj te-tasoj ktp.).

Kiomgrade ambaŭ formoj de naciismo estas distingaj trajtoj ne de popolo, kiel tion volas montri burĝaj verkistoj, sed rekta respeguliĝo de klasaj interesoj de la burĝaro — tion oni povas vidi sur jena ekzemplo, en kiu la sama burĝaro efektivigas ekonomian ofensivon kontraŭ unu nacio kaj defendas sin kontraŭ ekonomia ofensivo de la alia.

Ĉi-okaze unu sama nacio posedas ambaŭ formojn de naciismo. Juna tatara kapitalismo en sia interpuŝiĝo kun la potenca grandrusa burĝaro efektivigas rilate al ĝi politikon de enfermiĝo, celante konservi ligon kun "sia" popolo sur la bazo de unueco de la lingvo, kulturo ktp.

Sed la sama tatara burĝaro okupas, rilate al pli malforta uzbeka kapitalo, ofensivan politikon, kaj en ĝia agado oni povas trovi ĉiujn elementojn de la politiko, uzata de la grandrusa burĝaro kontraŭ la tatara.

Tatara komercisto penas okupi en Turkestano la komandantajn postenojn, venigas kun si tataran mulaon, tataran instruiston, tataran libron ktp. ktp.

La "nacia karaktero" mem, sur kiu tiom multon bazas la nacia burĝa scienco, estas rekta respegulo de la stato, en kiu estas klasaj interesoj de la burĝaro.

Tataro en rusa nacia carepoka lernejo estis karakterizata kiel malkuraĝulo, mensogulo, ktp.

En uzbeka vilaĝo tataro estis karakterizata kiel kuraĝulo, arogulo, premeganto ktp.

En ĉi difinoj plene respeguliĝas la esenco de ofensiva naciisma politiko de la grandrusa burĝaro rilate al la tatara kaj ĉi ties defende-naciisma politiko rilate al la burĝaro grandrusa.

Kaj paralele al tio — la ofensive-naciisma politiko de la tatara burĝaro kontraŭ la uzbeka kaj la defenda pozicio de ĉi lasta kontraŭ la tatara.

Tio, kion burĝa scienco nomas nacia karaktero, estas respeguliĝo de klasaj interesoj, kiujn havas burĝaro de iu nacio, kaj de la stato, en kiu estas ĝiaj fortoj en la batalo kontraŭ burĝaro de alia nacio. En unu sama nacio povas kuniĝi du kontraŭaj "naciaj karakteroj". (Daŭrigota.)

*Loĝigo.* Por prizorgi la konvenajn loĝejojn estas necese, ke la gek-doj mendu plej eble frue la deziratan ĉambron, ĉu privatan, ĉu hotelan ktp.

Gekamaradoj! Ne prokrastu la sendon de via aliĝilo. Se vi mem ne povas veni, tamen subtenu nin per via aliĝo.

## 2. listo de aliĝintoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| | | **Aŭstrio** | |
| 25 | K-dino | Steffi Müller, Wien II, | 2351 |
| 26 | K-do | Fiala Jos., Wien XV, | — |
| 27 | „ | Bergmeister, Karl, „ | — |
| 28 | „ | Treml, Rudolf Sollenau, | 857 |
| 29 | K-dino | Hemel, Mizzi, Wien XVI, | 1046 |
| 30 | K-do | Heeger, Theo, Wien XI, | 1180 |
| 31 | „ | Kr[illegible]lovitz, V., Wien XX, | 28 |
| 32 | „ | [illegible], Ludwig, Wien XXI, | 4399 |
| 33 | „ | Gattyan, Martin, Wien XII, | 351 |
| 34 | „ | Weyniger, Fritz, Wien VII, | 1253 |
| | | **Germanio** | |
| 35 | K-do | Bitzer, Rob., München, | 1810 |
| 36 | „ | Goth, Hermann, Waltersdorf, | 1225 |
| 37 | „ | Platiel, Herm., Landshut, | 3020 |
| 38 | „ | Schlittmann, Jos, Dachau, | 4160 |
| 39 | „ | Schlittmann, Georg, Dachau, | 4159 |
| 40 | „ | Späth, Karl, Dachau, | 4204 |
| 41 | „ | Gewand, Friedr., Kronshagen, | 3956 |
| 42 | „ | Weinhold, Albert, Leipzig, | 2568 |
| 43 | „ | Lerchner, Rich., Leipzig, | 90 |
| 44 | „ | Barthelmess, N., Leipzig, | 1768 |
| 45 | „ | Zimmermann,W., Ammendorf, | 2002 |
| 46 | „ | Emmrich, Friedr., Leipzig, | 37 |
| 47 | „ | Richter, F. C., Leipzig | 125 |
| | | **Belgio** | |
| 48 | K-do | Grignard, Pierre, Verviers, | 1854 |
| | | **Francio** | |
| 49 | K-do | Nicollet, Henry, Lyon, | 771 |
| | | **Nederlando** | |
| 50 | K-do | Raar, Jos., Leiden, | 4205 |
| | | **Ĉekoslovakio** | |
| 51 | K-do | Bauer, Franz, Gablonz, | 2066 |
| 52 | K-dino | Bauer, Emmi, Gablonz, | 2067 |

**Donacoj por la kongreso**

Berger, 3 S, Winkler, 1 S, Ort, 0,50 mk., Wolfschmitt, 0,50., Bitzer, 0,50 mk., Goth, 0,50 mk., Platiel, 0,50 mk., Schlittmann, G. kJ., 1 mk., Späth, 0,50 mk., Raar, 0,97 mk., Grignard, 2 b. fr. *La komitato de la V-a.*

## Proponoj debatotaj ĉe la Kongreso

**Propono n-o I**

"La kategorioj de subtenantaj kaj aspirantaj membroj estu kunfanditaj je unu kategorio: tiu de l' subten-membroj, ĉar aspirantaj membroj ankaŭ subtenas la asocion, sed ne estas aktivaj anoj. Kategorio de subtenantaj organ-ajoj kompreneble restas."
*(4520, 1122, 1447, Kremenĉug).*

**Propono n-o II**

"En la sektoroj, kie la anar-nombro superas 250, estu elektata superflua D. K.-ano por ĉiu plusa kvaron-milo, Ekz. por 500 anoj = 2 D. K. anoj, — por 750 = 3 D. K.-anoj ktp."
*(la samaj).*

**Propono n-o III**

"La voĉdoniloj por ĝenerala voĉdonado estu ĉiam dissendotaj nepre dum la unua monato post la fino de l' kongreso. E. K. estu komisiita ellabori iun elekt-sistemon, por ke la baloto por D. K. ne daŭru tutan jaron, se ne pli ol du monatojn". *(la samaj).*

**Propono n-o IV**

„Kiam samfamiliaj SAT-anoj loĝas kune kaj vivas komune, ili ĝuas favoran tarifon. Unu el ili pagu plenan kotizon, la aliaj nur duonan tarifon. Kompense, SAT liveru por ĉiuj nur unu jarlibron." . *(883, Rouen).*

**VARBU POR LA REKLAMA FAKO!**

# ELDONA FAKO

En ĉi numero vi trovas anoncon pri la unua volumo de "Biblioteko de Sennaciulo" ĵus elirinta ĉe nia kooperativa eldonejo. Necesas skizi al vi la planon de tiu nova biblioteko, ĝian originon, ideon, intencon kaj — metodon de ĝia disvastigo.

Pravigi la intencon, eldoni malgrandampleksajn volumojn en oportuna, agrabla poŝformato, kun plej diversforma enhavo, ni certe ne bezonas ĉe niaj literatur-amantaj kdoj. Ili salutos tiun intencon ĝoje kaj subtenos tiun entreprenon laŭpove. La ideo estas, respondi al la limigita aĉetpovo de niaj k-doj kaj provizi ilin per serio de malkaraj libretoj. Se ni atendus, ĝis kiam ni havus la ŝancon eldoni dikajn volumojn, ni devus konsoli niajn k-dojn, precipe tiujn, kiuj subtenis nin per aĉetado de akcioj, tre longan tempon. Por tamen montri rezultojn de ilia agado al la fervoruloj, ni senprokraste komencas efektivigi ŝatindan planon, la "*Bibliotekon de Sennaciulo*".

Unue ni tute neperiode prezentos al niaj k-doj kelkajn volumetojn tre diversenhavajn. Poste, eventuale depost oktobro ĉi-jare, ni intencas tute regule ĉiumonate aperigi unu volumon. Tamen nur se estos plenumitaj kelkaj antaŭaj kondiĉoj.

La biblioteko ampleksos tri seriojn (en nia imago):

a) serio literatura
b) serio soci-politika
c) serio scienca (Moderna Scienco).

Alterne do ni aperigus ĉiumonate unu libreton el tiuj tri kategorioj. Hodiaŭ ni prezentas al vi unuan libreton, kiu apartenas al la serio: "Moderna Scienco". Bonvolu havigi ĝin al vi, prijuĝi ĝian valoron. La serioj facile estos distingeblaj unu de la alia, ĉar ĉiu serio havos kovrilon de aparta koloro.

Por efektivigi nian intencon, ni alvokas la kamaradaron

**fariĝi abonantoj**

de nia biblioteko. Ni supozas, ke almenaŭ 500 kamaradoj sekvos nian alvokon kaj deklaros sin abonantoj de la etvoluma biblioteko je malkaraj prezoj (0,40—0,50 mk. po volumo). Definitivajn abonkondiĉojn ni hodiaŭ ne povas sciigi. Sed ĉiu povas kalkuli laŭ la citita prezo, kiom kostus serio de unu tuta jaro, dekalkulante de supra prezo ankoraŭ la 20 procentan rabaton por SAT-anoj. La abon-sumo, kiel vi vidas, estus ridinde malalta, pro tio ni esperas, ke multaj k-doj ĝis la fiksita templimo (oktobro) estos anoncintaj sin ĉe ni kiel abonontoj. Ni plifaciligos la aferon plue per tiu aranĝo, ke oni povu aboni *ĉiun serion aparte*, t. e. 4 volumojn ĉiujare. Abonontoj do sciigu al ni, ĉu ili deziras aboni ĉiujn tri seriojn, aŭ ĉu ili mendas tiun aŭ alian apartan serion de la eldonaĵoj.

Esperante, ke per tio nia eldon-agado multe pliviglĝos por la bono de SAT kaj de ĉiuj ĝiaj membroj, ni donas al vi tiun ĉi komunikon ĝoje kaj kun la promeso kontentigi vin per valoraj legaĵoj.

*Kelkaj informoj:* Ni ricevis de k-do. V. K. manuskripton "*Karl Marx, — Lia Vivo — Lia Verko*", kiu pro sia konciza formo prezentas atentindan laboraĵon. Ni prezentos ĝin en kadro de la "Biblioteko". Ĝi certe plaĉos al niaj k-doj. — Grandajn verkojn, kies presigon ni bedaŭrinde ne povas projekti por la proksima estonto, ofertas al ni kelkaj k-doj. Interalie k-do *Ŝirjaev* proponas aperigon de giganta traduko de la fama romano de *L. Tolstoj:* "Milito kaj Paco" (kvar volumoj!). Kvankam la traduko de tiu malnova esp-isto (de 1895) estas senriproĉa laŭ ĉiuj flankoj, ni ja ne povas plenumi nuntempe lian deziron, ĉar la eldono superus la fortojn de nia modesta kaso. Sufiĉe ampleksajn verkojn ankaŭ pretigis k-do *Teterin:* "Juĝa Tago" de *Korolenko,* kaj "Trusto D. E." de *Erenburg.* Kiu el la Liter.-Fakanoj deziras kontroli tradukon de k-do Zavada pri kooperativismo, bonvolu interrilatiĝi kun li: Adr: *J. Zavada,* ul. Krola Leszcynskiego 36/2., *Lublin,* Polio. Ni atentigas ankoraŭfoje ĉi-loke pri la *ateista krestomatieto* "Kontraŭ Dio", kiu pro siaj ilustraĵoj kaj la parte tre humora enhavo trovas multajn amikojn. *Eldona Kooperativo de SAT*


# BIBLIOTEKO DE SENNACIULO

Ĵus aperis la unua volumo de tiu nova poŝformata biblioteko!

A. Fersman

# LA KEMIO DE L'UNIVERSO

Kun antaŭparolo de la aŭtoro por la esperanta eldono

Trad. el rusa lingvo S. Rublev

Interesaj popularsciencaj studoj pri la kemiaj elementoj de la astroj, suno, planedoj, kometoj ktp., kun klara senvualigita perspektivo je estiĝo kaj pereo de mondoj. 78 paĝoj. Prezo: 0,50 mk. Bonvalutaj landoj: 1.— sv. frk.

ELDONA KOOPERATIVO DE SAT, LEIPZIG


Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG